

Gonzague de Reynold kaj Charles Albert Cingria kontraŭ Esperanto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 682, 1976-11-03 & 05 & 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Pasintan semajnon ni raportis pri la kontraŭesperantismo de la svisa franclingva verkisto Gonzague de Reynold. Ni ĉerpis nian informadon el artikolo aperinta en aŭgusto pasinta en la Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista. Hodiaŭ ni refoje ĉerpos el tiu ĉi 9-paĝa raporto pri prelego, kiun prezentis sinjoro Pierre Hirsch la 12-an de novembro 1975 en la legsalono de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Ni citos al vi tekstojn el alia svisa verkisto, Charles-Albert Cingria, plumamiko de Gonzague de Reynold. Ambaŭ verkistoj en la komenco de la 20-a jarcento estis anoj de literatura grupo, kiu strebis al rekonstruo de la iama Romia Imperio sur la bazo de la antikv-epoka romia tradicio kaj de la katolika tradiciismo. La organo de tiu ĉi literatura grupo estis La Voile Latine: la latina velo.

A.- Charles-Albert Cingria kaj lia amiko Gonzague de Reynold, kiuj aktive kontraŭstaris esperanton, estis Maurras-anoj. Jen kelkaj vortoj pri tiu ĉi politika tendenco, kiun oni ankaŭ nomas Action Française: Franca Agado. Maurras, kiu ĝin fondis, estis teoriisto politika: li proponis la restarigon de Monarkio en Francio, kontraŭ la Respubliko kaj la demokrata sistemo. Li komprenis la Monarkion kiel alianciĝon inter la Reĝo kaj la Popolo, sen iu ajn institucio aŭ klaso peranta inter ambaŭ ; tiu alianciĝo devis fariĝi kontraŭ la ekspluatantoj de la popolo (komercistoj, judoj, framasonoj, socialistoj, politikistoj, ktp.). Ĝi estis do sistemo antaŭfaŝista: kontraŭdemokratia kaj populisma, kiu trovis sian garantion en la ĝenerala konsento, sen alispeca perado.

Cl.- Sed kiamaniere svisoj povis esti Maurras-istoj kiel la verkistoj Charles-Albert Cingria kaj Gonzague de Reynold? Fakte en Svislando neniam estis reĝo! Probable ĉar temis pri la sola reakcia ideologio tiutempe disponebla en franclingvaj regionoj. Multaj intelektuloj subtenis tiun ĉi movadon en ĉiuj romandaj kantonoj.

A.- Jen kontraŭesperanta perlo, kiun la ĝeneva verkisto Charles-Albert Cingria publikigis en La Voile Latine okaze de la dua Universala Kongreso de Esperanto, kiun organizis Edmond Privat kaj Hector Hodler en 1906 en sia urbo Ĝenevo. En tiu ĉi teksto oni bone sentas koler-paroksismon kontraŭ la entuziasmo de la junularo por esperanto.

Cl.- Charles-Albert Cingria tiel priskribas la impreson, kiun donas al li la Universala Lingvo Esperanto :

A.- «Iru kaj kaptu birdon, cignon el nia lago ekzemple, senplumigu ĝin komplete, elŝiru ĝiajn okulojn, anstataŭigu ĝian platan bekon per tiu de vulturo aŭ aglo, greftu al ĝiaj kruraj stumpoj stilzojn de cikonio, loku en ĝiajn orbitojn pupilon de otuso, vestu ĝian dorson per plumoj ŝiritaj de kakatuo, ibiso, mevo kaj de ĉiaj birdoj de la mondo, kaj poste skribu sur viaj standardoj, disvastigu kaj kriu tiujn vortojn : ‘Jen la Univerasla Bird !’, kaj tiel vi havos etan ideon pri la sento de glaciigo, kiun kaŭzis al ni tiu timiga buĉado, tiu vomodora vivosekado, kiun oni ne ĉesis laŭde propagandi ekde la malfermo de la kongreso sub la nomo de Esperanto aŭ Universala Lingvo.»

Cl.- Ĉiam en la sama teksto titolita A propos de la langue Esperanto, dite Langue Universelle (Pri la lingvo Esperanto, nomata Lingvo Universala), oni ankoraŭ trovas la ĉi sekvajn perlojn:

A.- «Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne komplete perdis la senton de siaj tradicioj, lingvo vivas kaj pulsas; ĝi havas arteriojn; ĝi evoluas laŭ la profundaj leĝoj de nacio.»

Cl.- «Lernu, ho homoj sen tradicioj, kiuj havas cilindron de mekanik-muzikilo anstataŭ koro, ke en la litero ‘a’, historie ligita al la substantivo ‘patrino’, ni sentas pere de asonanco, la nomon de la Virgulino; ni flaras la sovaĝbestan odoron de la mamoj de la Romia Lupino, ni aŭdas la krion de la perfortitaj Sabeninoj, ni eĉ perceptas la akran odoron de la riz-lampoj kie la unue-naskitoj de la virinoj de Induso kaj de Gango vokis siajn patrinojn tremantajn pro la fora tigro krakiganta la kanojn per siaj molaj piedoj. Tiun vokalon ‘a’, la unuan, kiun oni rekonas en la ĝem-sonoj de infaneto, la natura tenero de l’homino, kiu superas la logikan sintakson, ligis al la patrino. Necesis esti tia homino, ne el karno, sed el pentrita lado, kia estas la fama profesoro, por ignori tion, kion la kvindek-ok mil revolucioj de la zodiakaj signoj ateste kriegas, supozante eĉ nur momenton, ke infano ĵus vekiganta el nekonscio rondigos siajn lipojn por eldiri la vokalon ‘o’: la patrino: la mère.»

A.- Komike estas, ke en la originala teksto, kiu estas franclingva, la vorto patrino, kiu diriĝas mère, ankaŭ ne havas la literon ‘a’, laŭ Charles-Albert Cingria ligita al la substantivo «patrino».

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012